

KANITZ F. (1943). *Serbia. Studiu de calatorie istorico-etnografic* (1904): (Serbio. Vojaĝa studo historia-etnografia), tradukita el la germana en la rumanan fare de S. Baciu, en *Românii*.

Memoriile (1994) = *Memoriile regelui Carol I al României de un martor ocular* ("La memoroj de la reĝo Karolo la I-a de Rumanio", verkitaj de proksima atestanto). Ed. Stelian Neagoe, IV, 1878-1881, București. Machiavelli.

NESTORESCU Virgil (1996). *Românii timoceni din Bulgaria. Grai. Folclor. Etnografie* (Timokaj rumanoj en Bulgario. Idiomo. Folkloro. Etnografio). București. *Fundația Culturală Română*.

NOE Constantin (1937). *Din trecutul Timocului* (El la pasinteco de (la regiono de) Timok). *Timocul*, București, p.1-3

POPESCU-SPINENI Marin (1941). *Românii din Balcani. Aspecte geopolitice și economice* (Rumanoj en Balkanio. Geopolitikaj kaj ekonomiaj aspektoj). *Tiparul Universitar*, București.

POPOVICI Atanasie (1943). *Memoriul românilor din Serbia, 1919* (La memorando de la Serbiaj rumanoj, 1919), en *Românii*.

ROMANSKY St. (1927). *Românii dintre Timoc și Morava* (Rumanoj inter Timok kaj Morava). Rumana traduko de Florea Ionescu en *Graiul Românesc*, București, I, p. 1

Românii (1943). *Românii din Timoc. III: Românii dintre Dunăre, Timoc și Morava. Culegere de isvoare* (Rumanoj de Timok. III: Rumanoj inter Danubo, Timok kaj Morava". Kolekto de fontoj). București: *Societatea Română de Statistică*.

SANDU-TIMOC Cristea (1996). *Tragedia românilor de peste hotare* (9-13 milioane). (La tragedio de la eksterlandaj rumanoj (9-13 milionoj). *Timișoara, Astra Română*.

TRĂPCEA Th. N. (1942). *Contribuții la istoria românilor din Peninsula Balcanică* (Kontribuoj pri la historio de la rumanoj en la Balkana Duoninsulo), *Balcania*, București, V, 1, p. 219-242

VELICHI Constantin (1945). *Românii din Bulgaria înainte de 9 Septembrie și astăzi* (Bulgariaj rumanoj antaŭ la 9-a de septembro 1044 kaj hodiaŭ). *Archivele Nationale Istorice ale României*. București. *Fondul Ministerului Culturii Naționale și Cultelor*, d. 4336

VELICHI Constantin (1970). *Imperiul Otoman și statele din Balcani între 1878-1912*. (La Otomana Imperio kaj la balkanaj ŝtatoj inter 1878-1912). *Studii și articole de istorie*, XV, București.

ZBUCHEA Gheorghe (1998). *Românii timoceni* (Timokaj rumanoj). *Dosarele istoriei*. București, III, 6, p. 44-45

Adreso de la aŭtoro

S-ro Doru NEAGU

Aleea Policlinicii

B1. G9, Sc.1, E7, Ap.16

RO – 6100 Brai lo

RUMANIO

<doru_neagu@k.r>

La komedio "Galanta Merkuro" de Edmé Boursault

(Originaleco de ideoj kaj formo)

Ljudmila MURSALIJEVA

Edmé Boursault (1638-1701) – kies nomon la aŭtorino de tiu ĉi mallonga eseo asimilas al Esperanto per Edmeo Bursoo, jam por la teksta oportuneco de la kutimaj derivaĵoj post esperantigita nomformo – estis samtempulo kun la plej granda komedi-verkisto en Francujo: Moliero (1622 – 1673).

Edmeo naskiĝis en Burgonjo, en familio de militisto. En la jaro 1651 li venis al Parizo kaj komencis literaturan verkadon. "Li estas unika aŭtoro, kiu, tute nesciante antikvajn lingvojn, sukcesis ne nur korekte skribi, sed fariĝis vera majstro de la lingvo; li kreis originalajn kaj ridigaĵajn komediojn, kiujn ne ĉiu verkisto kuraĝus montri en teatro. Bursoo havis naturan talenton, li uzis siajn internajn rezervojn".⁽¹⁾

Liaj plej bonaj teatraĵoj longe restadis en la repertuaro de la franca teatro, kion pravas multvoluma franca dramverkaro, eldonita en 1802.⁽²⁾ Edmeo Bursoo estis konstanta dramverkisto de "Burgonja Hotelo". En la jaro 1661 li debutis per unuakta komedio "Fluganta kuracisto", kreita en la tradicioj de masko-komedio. La intrigo baziĝas sur ŝajna malsano de la juna protagonistino. Ŝia patro deziras ŝian geedziĝon kun la viro, kiun li elektis. La junulino ŝajnigas malsanon por malhelpi la geedziĝon. La servisto de ŝia amato alivestiĝas kiel kuracisto. En la teatraĵo li ludas diversajn rolojn, aperas en diversaj vestaĵoj, saltas el unu fenestro en la alian – de tio venas la titolo de la komedio. Bursoo en sia komedio imitis la samtitolan teatraĵon de Moliero, kopiis apartajn scenojn.

Poste Bursoo verkis triaktan versoforman komedion "La viva mortinto". Du amikoj amas la saman junulinon. Unu el ili, por liberigi sin de la rivalo, friponas: li sendas al la rivalo falsan leteron pri la morto de lia patro kaj la neceso, urĝe veturi al ties enterigo. La servisto de la fripono alivestiĝas kiel fantomo de la morta patro, kaj li ve-

nas al la rivalo dumnokte por rapidigi lian forveturon. Hazarde la patro de la trompita junulo kaj la junulo mem troviĝas en la sama tranoktejo, sed neniu el ili scias pri tio. Tio permesas al la aŭtoro krei multajn komikajn situaciojn kaj miskomprenojn.

La sekva Bursoa teatraĵo "Portreto de pentristo" estas direktita kontraŭ Moliero, ĉar li pensis, ke Moliero intencis primoki lin en la rolo de *Licidas* en la komedio "Kritiko de edzinlernejo". Bursoo decidis venĝi sin pro la ofendoj. En sia teatraĵo li kritikis Molieron pro tio, ke li surscenigas realajn personojn. En iu sceno la stulta grafo laŭdas Molieron pro tio, ke li primokas famajn homojn. La grafo asertas, ke li havas "ŝlosilon" al la verko de Moliero (do, li konas la verajn nomojn de tiuj, kiujn Moliero primokas)! La servisto, sendita por serĉi la ŝlosilon, alportas **pordan ŝlosilon** – la sceno aludas, ke Moliero eniras senĝene en la privatan vivon de aliaj homoj.

Bursoo verkas ankoraŭ multajn teatraĵojn. La intrigo de la komedio "Seruro" baziĝas sur adulto. Edziniĝinta virino forkuras de la edzo kun sia amato; ŝia patro ĉion scias kaj helpas ŝin. La komedio "Nikandroj – aŭ Mensoguloj, kiuj ne mensogas" baziĝas sur konata antikva temo: la simileco de du fratoj-ĝemeloj kaj kun tio ligitaj miskomprenoj. Edmeo Bursoo verkis same pastoralon ("La okuloj de *Filis* transformitaj je steloj"), tragediojn ("*Germanicus*", "La princino de Klevo" laŭ la romano de s-ino de *La Fayette*), kelkajn historiajn novelojn, komedion ("Ezopo ĉe la kortego") kaj aliajn. Danke al la protekto de princo *Conde*, Bursoo estis prezentita al Ludoviko la XIV-a, kiu en 1671 lin enoficigis kiel redaktoron de la ĵurnalo "Gaja Muzo", destinata por eduki kaj distri la dukon de Burgonjo.

Dum longa tempo poste Edmeo Bursoo ne plu estis verkanta teatraĵojn, sed en 1679 li revenis en la teatron, kreinte "Galantan Merkuron", kies sukceso estis brila kaj longdaŭra. La teatraĵo montras, ke li maturiĝis kaj plene formiĝis en la Moliera skolo. En la antaŭparolo Bursoo skribas, ke en sia verko li volis "primoki kelkajn homojn de malsamaj karakteroj, kiuj pretendas, ke oni skribu pri ili en revuoj, forpuŝante tiujn, kiuj vere meritas tion.

"Mi pensas, ke mi bone kompleksis al la redaktoro de la revuo kaj al tiuj homoj, pri kiuj mi volas paroli – se mi sukcesis krei portretojn sufiĉe similajn, por liberigi kelkajn homojn de la laboro aŭskulti stultaĵojn, kaj kelkajn aliajn – de la honto diri ilin." ⁽³⁾

Bursoo trovas originalan formon por esprimi sian ideon. Daŭrigante

la tradiciojn de *Desmarets* "Fantaziemuloj" kaj de la Moliera "Enuiguloj", li kreas komedion-revuon, konsistantan el apartaj epizodoj, ene de bone trovita ĝeneraliga situacio. La intrigo baziĝas sur la amo de du genobelaj: *Cécile* kaj *Oronte*. La patro de *Cécile*, s-ro *Boiluisant* estas granda admiranto de la revuo "Galanta Merkuro" kaj decidis edzinigi sian filinon nur kun ĝia redaktoro *Licidas*, kuzo de *Oronte*. *Oronte* petas sian kuzon permesi al li, fariĝi dum mallonga tempo la redaktoro de tiu ĉi revuo, por ke la patro de *Cécile* permesu ilian gedziĝon. Li do fariĝas redaktoro. Lia ĉefa helpanto-sekretario fariĝas *Merlin*, kiu preparas la liston de ĉiuj, kiuj volas esti sur la paĝoj de "Galanta Merkuro". Tio evitigas al la aŭtoro montri sursceneje la plej diversajn personojn kaj iliajn mankojn.

Oronte jam vidis multajn treege strangajn personojn: "Unu el ili volas eldoni sian skribaĵon; nur en "Galanta Merkuro" li vidas sian savon. – Alia, ne multe komprenanta pri muziko, revas, ke la reĝo enoficigos lin kiel ĉefon de kortegaj muzikistoj. – La tria trovis solvon de iu enigmo kaj pensas, ke li estas geniulo; sed en vero li estas stultulo ..." (I, 1). Bursoo plurfoje parolas (pere de la buŝoj de diversaj personoj) pri la temaro de la revuo, substrekante ĝian variecon. Lia servisto *Merlin* fanfaronas, ke en la revuo vi povas legi "... historiojn, aventurojn, enigmojn, idiliojn, epigramojn, sonetojn, madrigalojn, dialogojn, vi povas ekscii pri geedziĝoj, koncertoj, donacoj, festoj, baloj, ludoj, distroj; glorigi iun, ekscii pri emocioj, ĉagrenoj, enterigoj; tie ĉi oni skribas pri ĉiuj novaĵoj." (I, 1)

Unu el la plej elstaraj personoj en la komedio estas burĝo *Michaut*, filo de kuracisto kaj nepo de apotekisto, kiu preskaŭ ne konas siajn antaŭulojn. Lia patro, kiu riĉiĝis per kuracado, lasis al li grandan heredaĵon. *Michaut* ŝanĝas sian loĝlokon, konstruas pompan domon kaj ordonas al ĉiuj servistoj, nomi lin "nobela moŝto". Li ege laŭdas la revuon: "Merkuro estas bonega. En ĝi vi povas trovi ĉion: historion, versaĵon, prozaĵon, batalojn, procesojn, mortojn, geedziĝfestojn, amon, provincajn novaĵojn, kortegajn novaĵojn ... Laŭ mi, ĝi estas la plej utila eldono" (I, 2). Li venis en la redakcion kun ununura celo: per impona pago gajni bonan genealogian arbon: "Mi parolas tute sincere. Jam ses monatojn mi amas junan markizinin, belan, bonstaturan, noblan... Ŝiaj parencoj, por kiuj la plej malalta titolo estas grafo aŭ vicgrafo, treege ŝatas nobelecon. Ili interparolis kaj decidis, subteni mian am-pasion – kondiĉe ke miaj antaŭuloj estu same nobelaj kiel ili. Mi venas al vi por prinobeligi mian genton!" (I, 2).

La redaktoro mire ekkrias, sed *Michaut* respondas trankvile: "Vi ĉion povas. "Merkuro" estas plenplena da nobeloj, **kiujn vi faris.**" (I, 2). *Michaut* eĉ proponas la metodon, kiamaniere eltrovi por li nobelajn antaŭulojn: "Serĉu ian estingiĝintan genton, aldonu al ĝi novan branĉon. Elpensu iun ajn historion. Kaj tio, kio estis malvera, fariĝos tuj tute verosimila ... " (I, 2). Li konstante klarigas: "Vi pensas, ke en la kortego ĉiuj nobelaj sinjoroj portas sian propran nomon? Multaj konataj sinjoroj forgesis sian nomon. Se mortintoj revenus (de supre aŭ de malsupre), multaj patroj eĉ ne rekonus siajn filojn ... Jam post 50 jaroj ne plu eblas trovi siajn gent-radikojn. Mi scipovos danki vin pro viaj zorgoj. Mi havas brilanton, kiu kostas 80 pistolojn." (I, 2).

Oronte rifuzas kolere, sed *Michaut* samkolere respondas: "Kiel vi volas – se vi estas tioma formalisto. Adiaŭ. Mi trovos homon, kiu okupiĝas pri genealogioj. Li, por kelkaj moneroj, tuj trovos por mi la fontojn, kiujn mi deziras." (I, 2).

Sur la scenejo aperas s-ro *Longuemain* (t.e. "longa mano"), impostkolektisto, koruptulo. Li rakontas sian vivfilozofion: "Por vivi honeste, necesas esti riĉa. La honesteco estis iam bonega afero, sed nun malhonesteco estas multe pli utila. Eĉ se vi havas multajn talentojn, honestmaniere vi neniam riĉiĝos." (II, 4). Li opinias, ke li estas tute honesta homo, ĉar li konas multajn alte estimatajn personojn, kiuj riĉiĝis sammaniere kiel li. (II, 4).

Sur la scenejo aperas la edzino de oficisto, s-ino *Guillemont*. Ŝi ordonis kudri por si mantelon el ruĝa tafto, destinita por mebloj kaj kurtenoj, ĉar en tiu momento la ruĝa koloro estis tre laŭmoda. La sinjorino ege fieras pri sia eltrovemo kaj volas, ke oni skribu pri ŝi en la Revuo (I, 3). Tiu persono "havis sian prototipon en Parizo".⁽⁴⁾

La eldonisto *Boniface*, ruinigita pro eldonado de dikaj libroj, volas denove riĉiĝi publikigante mortanoncojn (II, 7). La spektanto vidas samtempe du junajn virinojn, kiuj tralegis en la revuo la artikolon pri la utilo de silento kaj decidis paroli nun malpli. Sed ili senĉese diskutas, kiu el ili pli bone silentas. (IV, 3). "Bursoo lerte uzas tipan naturan difekton de virinoj – la babilemon. La stilo tie ĉi respegulas la celon: ĝi fluas samrapide kiel penso."⁽⁵⁾ La rakonto de maljuna soldato, *La Rissolle*, pri siaj gloraj agoj estas senĉese interrompata de lia servisto, kiu substrekas liajn lingvajn erarojn (IV, 6). "Ne eblas pli bone montri lingvajn erarojn, ol tion faras *La Rissolle* – kaj lian koleoron, kiam oni korektas ilin."⁽⁶⁾

Du prokuroroj, s-ro *Brigandeanu* kaj s-ro *Sangsus* (la nomoj aludas pri rabisto kaj sangosuĉisto) diskutas, kiu el ili estis primokita de la italoj en la rolo de arlekeno-prokuroro. Ilia diskuto estas akra pamfleto kontraŭ juĝistoj. "Necesas rimarki, ke tia ĝenerala kritiko de iuj sociaj tavoloj ĉiam estis uzata en teatro: ju pli la aŭtoro troigas, des malpli elstaraj estas la personoj. Komika efekto aperas el la kontrasto de juĝa terminaro kaj parola lingvo – tio estas la ĉefa kaŭzo, kial verkistoj ŝatas krei similajn tipojn; same la medicina terminaro permesis al Moliero primoki kuracistojn, ilian pedantismon kaj malklerecon."⁽⁷⁾

Kiam la teatraĵo de Bursoo estis verkita, s-ro *Devize* (la redaktoro de "Galanta Merkuro") faris ĉion por malhelpi ĝian surscenigon. Malfacile estas kompreni, kial la verko, kiu montras ĵurnalistojn en tiom favora lumo, kaŭzis tiuspecan reagon. *Devize* ne sukcesis malpermesi la komedion – la aŭtoro Bursoo nur ŝanĝis la titolon kaj nomis ĝin "Teatraĵo sen titolo". Nur post la morto de Edmeo Bursoo la verko retrovis sian originan nomon.

Notoj

(1) "Notice sur Boursault" en "Répertoire du théâtre français", de M. Petitot, Paris, Vol. 9, MDCCCIV, p. 3.

(2) *Ibid.*, v. 1-22, MDCCCIV.

(3) ekde ĉi tie kaj poste ni citas la komedion de Boursault "Galanta Merkuro", trad. de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, laŭ la eldono: "Répertoire du théâtre français" de M. Petitot, Paris, Vol. 9, MDCCCIV, p. 29.

(4) *Ibid.*, p. 138.

(5) *Ibid.*, p. 139.

(6) *Ibid.*, p. 139.

(7) *Ibid.*, p. 139-140.

Aŭtora adreso

D-rino **MURSALIJEVA Ljudmila Ivanovna**

ul. Komarova, d. 26, kv. 21

Rossia, Baŝkiria, 450044, Ufa - 44

RUSIO

Tel.: (7-3472)-42-03-42

Priaŭtora informo

La aŭtorino estas doktoro pri filologio kaj fakulo pri la franca dramverkaro en la XVII-a kaj la XVIII-a jarcentoj, aparte pri la komedia ĝenro. Ŝi studas postmoleriajn komediverkistojn kiel ekz. *Mariveaux*, *Dancourt*, *Dufresny* kaj ilian rolon en la historio de la franca teatro. Ŝi laboras en la Baŝkiria Ŝtata Universitato (turbo *Ufa*), kie ŝi instruis dum multaj jaroj la francan lingvon kaj nun instruas la historion de Okcidenteŭropa literaturo kaj kulturo.